

Esperanto-Informilo

64-a jaro

por Berlin kaj Brandenburgio

(662) 10-12/2014

Gratulon al multmeritulo



Okaze de la 90-jariĝo de prof. d-ro Ignat Florian Bociort

La konata rumana sciencisto, interlingvisto kaj esperantisto prof. d-ro Ignat Florian Bociort ĉi-jare la 13-an de oktobro festis sian 90-an naskiĝtagon.

Prof. Bociort estas al ni esperantistoj de Berlino aparte proksima, ĉar ekde komence de la 1990aj jaroj li ankaŭ estas nia samurbano, ne laste pro sia simpatia kaj same aktiva germana edzino Ursula, rumanistino, kiu ankaŭ bone orientiĝas en Esperanto kaj multflanke subtenis kaj daŭre subtenas lian agadon.

La jubileo por ni estas bonvena okazo tre kore gratuli al la profesoro kaj deziri al li ĉion bonan por la sekvaj vivo-jaroj.

Ni bone memoras liajn diversajn prelegojn kaj aliajn aktivaĵojn, kiuj eĉ reiras ĝis la tempo antaŭ 1990, kiam li laboris en la Humboldt-Universitato de orienta Berlino.

La jubileo ankaŭ estu okazo por iom informi pri la sciencisto.

Ignat Florian Bociort naskiĝis 13.10.1924 en sud-okcidenta Rumanio kaj plenkreskis en mez-kamparana familio. Li faris konsiderindan karieron kiel kultursciencisto (specialisto pri estetiko) kaj kiel tia estas estimata en rumanaj sciencistaj rondoj.

Li studis filozofion (1945-1949) kaj filologion (1946-1950) en la Universitato de Bukareŝto kaj doktoriĝis pri filozofio en Humboldt-Universitato de Berlino. Sekvis diversaj profesoraj instru-postenoj en la universitatoj de Bukareŝto (rumana lingvo kaj literaturo), Timiŝoara (estetiko kaj literaturo) kaj Berlino (rumana studoj). I. F. Bociort ankaŭ estas orda profesoro de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San-Marino. Li estas membro de kelkaj akademioj. Dum multaj jaroj prof. Bociort kaj lia edzino estis membroj de Gesellschaft für Interlinguistik (Societo pri Interlingvistiko) en Berlino.

La sciencisto estas aŭtoro de pluraj libroj pri estetiko, literatura teorio, interlingvistiko kaj Esperanto. Li emeritiĝis en la jaro 1995.

La decidajn impulson por lerni, apliki kaj disvastigi Esperanton li ricevis en (orienta) Berlino dum la 1960aj jaroj.

Post la doktoriĝo en Berlino prof. Bociort hejmenvenis al Rumanio kaj estis ege aktiva en la tiea nacia Esperanto-movado, kiun li tre revigligis. Malgraŭ tre malfavoraj cirkonstancoj dum la tempo de Ceaușescu, kiam la Esperanto-movado estis oficiale malpermesita, li sukcesis akiri laŭleĝan agadkampon por Esperanto en universitataj kaj sciencaj medioj kaj gvidis la rumanian Esperanto-movadon en diversaj postenoj. Li kuraĝe kaj persiste kontaktis persone pli ol 20 ministrojn kaj aliajn altrangulojn, kiuj ekde tiam ŝirmis la antaŭe malpermesitan agadon. Tiel li sukcesis en 1978 krei la Akademian Kolektivon pri Esperanto kaj Interlingvistiko, kadre de la rumana Akademio pri Sociaj kaj Politikaj Sciencoj. Tiu kolektivo fariĝis grava faktoro por enkonduki Esperanton kiel oficialan, nedevigan studobjekton en ĉiujn filologiajn fakultatojn de la lando kaj estigis Esperanto-sekcion en la rumana Societo pri Filologiaj Sciencoj. Io tia en neniu alia lando de la mondo okazis lige al Esperanto. Tamen en la jaro 1985 en Rumanio la Esperanto-agado denove estis tute malpermesita kaj li kaj la ĉefaj kunbatalantoj suferis persekutojn.

Prof. Bociort verkis plurajn librojn por la lernado de Esperanto, gvidis la laboron por la apero de rumana-esperanto vortaro kaj zorgis pri apero de kvarlingva konversacia libro ktp. Post la falo de la diktaturo fine de la jaro 1989 fondiĝis la longtempe atendata Esperanto-Asocio de Rumanio, kies unua (kaj nuntempe honora) prezidanto li estas. Pro siaj multaj

meritoj prof. Ignat Florian Bociort estas distingita per honora membreco de UEA.

Kompilis Detlev Blanke, i.a. el Vikipedio

«Plenbuŝe» dekjara

Sapienti malsat'
(libere laŭ Terencio)

Kun tuta la aranĝo-mondo
Nun festu nia manĝorondo!
Jen tostoj, ne malbena pluŝo,
Audiĝu el plenplena buŝo!

Diboĉu ĉi burleska opo
Ĉe bonfritita eskalopo,
Fiŝaĵoj kaj perdrika ŝinko,
Bongustaj nur kun ŝika drinko.

El glas', ne el ĉevala tino
Varmigu nin itala vino!
Ĉe francaj brandoj, greka supo
Vivu ni, malseka grupo.

Nu ek, kaj efemere klaĉu!
Aŭ, laŭprefere, klere maĉu,
Dum nia Esperanto kara
Eksonas kiel kanto rara.

Gerd Bussing



La rondo Esperanto? Plenbuŝe! por babilemuloj-frandemuloj festos sian dekjarigon la 31an de oktobro ekde la 19a 30 en la vjetnama restoracio Chay Viet, Brunnenstr. 164, 10119 Berlin. Venu multnombre!

pb

Willkommen auf dem Esperantoplatz! Bonvenon sur la Esperantoplaco!

Nach der Begrüßung in Deutsch und Esperanto erklang auf dem Esperantoplatz in Berlin-Neukölln zu Beginn des diesjährigen Sommerfestes am 3. September der Willkommensgruß auf Türkisch, Griechisch, Polnisch, Russisch und weiteren Sprachen. Hier trafen sich Anwohner und Gäste, die verschiedene Sprachen sprechen und unterschiedlichen Kulturen, Anschauungen und Religionen angehören.



«Uns gehört der Esperantoplatz – Wir machen was draus! ». Das war das Motto des Festes und die Münchner Künstlerin Adler A.F., als Trash Queen auftretend, brachte es in ihrer Performance künstlerisch auf den Punkt. In gut dadaistischer Manier ihren Schreitanz zelebrierend nahm sie wie schon in den Vorjahren auf dem Esperantoplatz ihr Publikum gefangen und verkündete Botschaften wie «Keine Profite mit der Miete!», «Der Esperantoplatz – wir lassen ihn verändern!». Damit eröffnete sie auch die Aktion «Rede Klartext unter der Zamenhofeiche!». Für die Esperanto-Liga Berlin, gemeinsam mit A-Z Hilfen Berlin Veranstalter des Festes, sprach Ronald Schindler den Wunsch aus, der Esperantoplatz möge sich so verändern, dass er viele Leute anlockt und positive Schlagzeilen macht. Der Künstler

Christoph agi Böhm stellte ein Modell seiner «Vogel Welt Stadt» für den Platz aus und bot an, mit seiner Gestaltung, die vorsieht, farbige Vogelhausgruppen umwelt- und kunstgerecht in den Bäumen anzubringen, den Platz attraktiver zu machen.

Der Begrüßungstanz der Kinder der Kita St. Richard, die Tanzdarbietung der Mädchen aus der Löwenzahn-Grundschule, die Spiele von Roma Trial e.V. mit den Kindern, das Improtheater der Jugendlichen vom Interkulturellen Theaterzentrum (itz), und das Spielangebot des Kinderpavillons ließen schnell Feststimmung aufkommen.

Begleitet durch die Musik der Klezmer-Musikgruppe «Querbeet» und des Akkordeonisten Alexander Danko konnten sich die Besucher an den Infotischen der beteiligten Vereine und Institutionen informieren, sich bei Kaffee und Kuchen unterhalten oder aber an der von den Stadtagenten über das Programm Soziale Stadt organisierten Pflanzaktion auf dem Esperantoplatz teilnehmen. Viele Kinder waren mit Begeisterung dabei. Einige Besucher ließen sich von Pater Hofmann durch die Katholische Kirche am Esperantoplatz führen, andere beteiligten sich am Quiz am Infotisch des Quartiersmanagements.



Die Ausstellung «111 Jahre Esperanto – Sprache und Kultur in Berlin und Brandenburg» wurde hier in passender Atmosphäre erstmalig gezeigt und fand ein interessiertes Publikum.

Mehr als 20 Esperantosprecher zählten zu

den ca. 100 Besuchern. Einige waren von weither auf den Berliner Esperantoplatz gekommen, so Janusz aus Zielona Góra und Dr. Schwarz aus Dresden. Alexander Danko, geboren in Rostow am Don, meinte bei seiner Vorstellung: «Esperanto bedeutet für mich Freude und Freunde.»

Peter Bäß sang in Esperanto zur Gitarre und kündigte einen Esperanto-Kurs für Anfänger im itz an.

Gäste, mit denen die Akteure ihre Anliegen zum Platz und zum sozialen Engagement im Kiez besprachen, waren der Neuköllner Bezirksstadtrat für Soziales Bernd Szczepanski (Bündnis 90/Die Grünen) und unser Ansprechpartner im Grünflächenamt Rainer Sodeikat.

Das Fest trug dazu bei, den Esperantoplatz, die grüne Oase in der Nähe des Bahnhofs Sonnenallee, das Tor zum Böhmisches Viertel und zum alten Rixdorf als Treffpunkt verschiedener Kulturen und Sprachen weiter aufzuwerten und zu gestalten.

Beiträge zum Sommerfest und zur Jubiläumsausstellung auf den Webseiten der Esperanto-Vereinigung Berlin-Brandenburg: www.esperanto.berlin

Fritz Wollenberg

€€€€€€€€€€€€€€€€€€€€€€€€€€€€€€

Unsere Spendenaktion für die künstlerische Aufwertung des Esperantoplatzes geht weiter. Bisher konnten schon 550 € gesammelt werden.

Empfänger: Esperanto-Liga Berlin /
Verwendungszweck: «Spende Esperantoplatz»

IBAN: DE38100100100070550102

BIC: PBNKDEFF100 (Berlin)

Bank: Postbank, Kontonummer: 70550102
(Postbank Berlin) 7 BLZ: 10010010.

Spendenquittung kann ausgestellt werden.

€€€€€€€€€€€€€€€€€€€€€€€€€€€€€€

Sukcesa Esperanto-stando dum la vegan-vegetara somera festo en Berlino

Inter la 29a kaj 31a de aŭgusto okazis en Berlino, sur la konata Alexander-placo, la t.n. vegan-vegetara somera festo. Tie oni povis ĝui ne nur senviandajn, sed ekskluzive senbestaĵajn manĝaĵojn, aĉeti diversajn varojn produktitajn sen ekspluato de bestoj aŭ simple informiĝi pri iniciatoj por bestprotekto aŭ bestaj rajtoj. La festo, kiu allogis laŭdire rekordajn 50.000 vizitantojn - inter ili multajn ne-berlinanojn - okazis ĉi-jare jam la 7an fojon, sed unuafoje ĝi havis ankaŭ standon, kiu informis pri Esperanto.



Organizis ĝin lokaj vegetaraj Esperantistoj nome de TEVA, la Tutmonda Esperantista Vegetara Asocio, kiu jam de 1908 disvastigas vegetaranismon inter E-istoj kaj Esperanton inter vegetaranoj. Deĵoris tie ankaŭ helpantoj de ekster Berlino, tiel ke dum ĉiuj tri tagoj almenaŭ po du homoj povis informi la preterpasantojn pri la rilatoj inter Esperantismo kaj veg(etar)anismo, do pri la idealo de senperforto, egalrajteco, daŭripoveco k.a. Impresis la interesatojn, kiuj ĝenerale tre malfermmense kaj sincere reagis al niaj informoj, ke inter la E-istoj troviĝas elcentaĵo de veg(etar)anoj konsiderinde pli alta ol en la demografia averaĝo, nome laŭ enketo el la pasinta jaro ĉ. 25 % de la virinaj kaj 15 % de la viraj Esperantistoj.

Ĉe la budo, kiu situis sufiĉe oportune en la centro de la festejo kaj kiun ornamis grandaj afiŝoj pri TEVA kaj pri Esperanto, ni informis per la kutimaj faldfolioj de GEA, per provekzempleroj de la TEVA-a «Esperantista Vegetarano» kaj precipe per propra faldfolio germanlingva, kiun ni produktis por la festo kaj kiu koncize informis pri la lingvo, lerneblecoj, TEVA kaj la rilatoj inter la du «verdaj» movadoj. La materialoj estas elŝuteblaj en la anonca artikolo je <http://esperanto.berlin/stand-auf-dem-veggie-fest/>. La presadon de la varbiloj finance subtenis GEA.

Ĝenerale oni povas esti tre kontenta rilate la reklaman efikon, ni disdonis nur de la specialaj faldfolioj ĉ. 400 ekzemplerojn, kaj 36 homoj postlasis sian retadreson por ricevi informojn pri okazonta Esperanto-kurso, dum multaj aliaj notis la adreson de la koncerna retpaĝo. Per akompana raportado pri la stando en Fejsbukoj ni povis krome informi ĉ. 1300 homojn, kvankam tiuj verŝajne plejparte estis jam Esperantistoj.

Plurfoje nin alparolis eĉ homoj, kiuj iam lernetis la lingvon aŭ registriĝis en la retpaĝo lernu.net, kaj kiuj pro nia ĉeesto sproniĝis (re)aliri la lingvolernadon. Unu sinjoro reprezentis la foiron «Du und deine Welt» okazonta oktobrokomece en Hamburgo, kiu interalie traktos bestprotektadon. Li invitis nin senpage informi tie dum unu tago pri Esperanto kaj vegetarismo; laŭ la lastaj planoj tia stando efektiviĝos, por kio la novaj faldfolioj kaj flago certe konvenos.

Ĉar veg(etar)anismo en la pasintaj jaroj iĝis ĉeftendenca, okazas pli kaj pli da tiaj festoj kiel en Berlino ankaŭ en aliaj urboj kiel Köln, Speyer, Düsseldorf k.m.a. Evidentiĝis dum tiu nia unua stando Esperantista dum tia festo, ke la vizitataro estas tre malferma al nia temo. Pro tio indus en la venonta jaro ne nur ripeti nian standon, sed nepre okazigi

informadon pri Esperanto ankaŭ en aliaj urboj. Volonte ni dividas niajn spertojn kun aliaj verdaj informemuloj.

Cyril Brosch - Felix Zesch

Jubileaj aranĝoj en novembro 111 jaroj Esperanto en Berlino kaj Brandenburgio

La 13an de novembro je 18a horo en Oranĝerio, salono «Studentenblume – tageto» (Schulze-Boysen-Straße 38) okazos Solena malfermo de la ekspozicio «111 jaroj Esperanto – lingvo kaj kulturo en Berlino kaj Brandenburgio» Esperanto-Asocio Berlino-Brandenburgio kaj «KiezsPINne r. A.», en kiu EABB membras, komune invitas al la aranĝo.

Kio okazos?

Muzika kontribuo, gvido kaj en Esperanto kaj germanlingve tra la ekspozicio fare de Fritz Wollenberg eksplikante la fonon de la prezentataj fotoj kaj tekstoj kaj montrante interesajn aldonajn materialojn nur en tiu aranĝo, interparoladoj ĉe bufedo.

La 29an de novembro de 14a ĝis 18a horo en «Oranĝerio» - granda salono ni renkontiĝos al Jubilea Zamenhoffesto.

Estos prezentataj eroj el la manuskripto de la Jubilea Libro 2014. Johann Pachter, al kiu ni deziras resaniĝon, planas oferti Libroservon. La kafejo en vestibulo de la Oranĝerio regalos nin. La Jubilea ekspozicio ekde la 24a de novembro en Oranĝerio videbliĝas.

Kiu deziras kontribui al la aranĝado de la festo bonvolu kontakti nin.

Metrostacio Magdalenenstraße (U5), elirejo Frankfurter Allee/Schulze-Boysen-Straße (Ruschestraße)

Estraro de Esperanto-Asocio
Berlino-Brandenburgio

Kelkaj rememoroj pri la 84-a Universala Kongreso en Berlin

Ĉu vi ankoraŭ memoras detalojn pri Universalaj Kongresoj, kiujn vi partoprenis en la pasinteco? Mi apenaŭ. Mi eĉ la temon de la UK en Berlin, kiu okazis en 1999, do precize antaŭ 15 jaroj, tute forgesis. (Ĝi estis «Tutmondiĝo – ŝanco por paco?», kiel mi ĵus eksciis el miaj dokumentoj). Tamen rememorojn mi ja havas, sed ili preskaŭ tute ne rilatas al la kongresa temo, nek al prelegoj, nek al ekskursoj. Ĉar mi, samkiel pluraj lokanoj kaj nelokanoj, havis gravajn taskojn en la dumkongresa organizado. Tial mi perceptis la eksterordinaran eventon, kvankam mi troviĝis meze en ĝi, kvazaŭ nur deflanke.

Al miaj taskoj apartenis ekzemple renkonti kaj akcepti la invititajn artistojn, muzikistojn kaj ĵurnalistojn ĉe la enirejo de la kongresejo kaj gvidi ilin al la ĝusta loko. Sed ne nur tio, mi devis ankaŭ respondi al iliaj demandoj, ekscii iliajn bezonojn kaj dezirojn. Tio ne ĉiam glate funkciis, ĉar kelkaj el ili estis iom kapricaj kaj postulemaj. Mi mem, almenaŭ komence, havis malfacilaĵojn orientiĝi en la giganta kongresejo, de kiu ni esperantistoj tamen okupis nur duonon. Multo okazis sur la etaĝo, kiu ricevis la nomon «Kulturetaĝo Jean Forge». La kulturan programon lerte kaj faksperite gvidis Ulrich Becker, siatempe ankoraŭ berlinano. Al li oni povis ĉiam rifuĝi, se oni estis konfrontita kun iu ŝajne nesolvebla problemo.

Foje mi devis sidigi virinan koruson, laŭanonce dudekpersonan, en la seĝaro de la granda aŭditorio. Por ili estis rezervitaj difinita kvanto da sidlokoj. Sed la estrino de la koruso aplombe asertis, ke ili estos kvardekope kaj bezonas multe pli da lokoj. Tio kaŭzis rimarkindan konfuzon. Mi ne plu scias, kiel ni solvis la problemon. Nur, ke poste montriĝis, ke ili efektive estis nur dudekope.

Alia tasko de mi estis gardostari antaŭ salonoj kaj atenti la bonordan eniron de la homoj kaj malhelpi, ke post la komenco de prelego ankoraŭ eniru malfruiĝantoj. Tio memkompreneble koncernis ĉiujn prelegojn. Al unu el la ĝenerale tre ŝatataj prelegoj de d-ro Amri Wandel pri astronomia temo post la komenco daŭre alvenis ankoraŭ personoj, kiuj sub iu preteksto postulis eniron. Unu asertis, ke lia edzino jam estas en la salono, alia ke li nepre devas ion transdoni al la preleganto, alia ke li jam antaŭe estis interne de la salono kaj nur por kelkaj minutoj forlasis ĝin ktp. Mi ne ĉiam sukcesis rifuzi al ili la eniron, kelkaj eĉ perforte malfermis la pordon, ignorante miajn protestojn.

Ĝuste en la tempo, kiam okazis la kongreso, Lena (ankaŭ ŝi havis siajn dumkongresajn taskojn) kaj mi estis translokiĝantaj. Portempe ni disponis pri du loĝejoj, ambaŭ en ne tro granda distanco de la kongresejo. En la nova, kiu estis tute malplena kaj en restaŭrenda stato, dormis tri homoj sur primitivaj matracoj. La malnova, ankoraŭ loĝata de ni, kvankam relative malgranda, havis unu sufiĉe grandan ĉambron. En ĝi dum la kongresa semajno ni gaje tranoktis kvinope en iom nekutima kunpremiteco. En la vespero de la ekskursita tago ni invitis dek pliajn homojn por festado, muzikado kaj bongusta manĝo. Lena ludis gitaron kaj kantis, Ite Tytgat el Belgio verve akordionis.

Estis sufiĉe varmaj tagoj, kion oni memkompreneble ne sentis en la klimatizita kongresejo. Lace sed kontente ni povis respiri en la impona malferma aranĝo de tiu laŭdire (laŭ-dire) sukcesa, bone organizita kongreso.

Gerd Bussing

Neatendita ŝanco!

... okazis, ke la studentino Alisa Laila Fluhrer alskribis min, ĉu mi ne povus prezenti Esperanton ene de internacia aranĝo, kiu okazu en Storkow/Mark en pitoreska ĉirkaŭaĵo, nome en la evangelia junulara edukejo kaj renkontejo Hirschluch (<http://www.hirschluch.de/>). Partoprenantoj estos junuloj el Ukrainio, Pollando kaj Germanio.

Mi supozis, ke tio estus bona ilo por montri al homoj, kielmaniere funkcias Esperanto kaj mi signalis mian prelegemon.

La granda tago estis la 21-a de aŭgusto 2014. Kiel kutime mi jam alvenis iomete pli frue ol la aranĝita tempo, pro tio mi sukcesis eĉ anonci la prezentadon antaŭ la tuta partoprenantaro de la aranĝo. Ĉar samtempe okazis pluraj aliaj programeroj, la prezento de Esperanto nur estis unu el diversaj eblecoj por pasigi la antaŭtagmezon por la junuloj. Tamen tuj multaj junuloj notis siajn nomojn sur listo de aŭskultantoj. Kiel mi eksciis, iu el ili eĉ partoprenis en la tuta renkontiĝo pro la anonciĝo de Esperanto kiel programero.

Je la 11-a horo kunvenis preskaŭ 30 junulinoj el Pollando kaj Ukrainio por informiĝi pri la internacia lingvo. Mi komencis en la angla lingvo, sed polinoj ne sukcesis sekvi min, pro tio oni decidis, ke la prezentado estu tradukita kaj al pola kaj ukraina lingvoj. Per tio mi memkompreneble nur havis la trionon de la planita tempo kaj mi devis urĝi.

Feliĉe mi preparis sufiĉe koncizan superrigardon pri Esperanto, kiun mi sukcesis prezenti ĝis la fino. Kiam oni proponis paŭzon por iomete ripozi, neniu el la aŭskultantaro deziris tion, do mi daŭrigis sen paŭzo.

Fine de la prezentado restis kelkaj minutoj por diskutado kaj mi esperas, ke mi sukcesis respondi la demandojn sufiĉe klare. Memkompreneble mi ankaŭ menciis, kie ili povos eklerni la lingvon.

Ĉar sekvis tagmanĝa paŭzo mi proponis post tiu montri filmetojn en Esperanto. Post la tagmanĝo kunvenis ĉ. 10 personoj, i.a. ankaŭ du, kiuj antaŭe ne sekvis la prelegon. Mi simple prezentis la tri unuajn filmojn de la dvd pri la internacia filmkonkurso. Precipe al la ukrainaj junulinoj plaĉis la kontribuaĵo pri la Pasporta Servo kaj ili eĉ diris, ke ili komprenis la enhavon.



Entute ĉiuj ŝajnis esti kontentaj. Ĉar la partoprenintoj de mia programero venis el malproksimaj urboj malfacilas vidi rezulton. Sed minimume ĉiuj okupiĝis pri Esperanto kaj eĉ povis kunporti hejmen kelkajn vortojn sur mallonga listo.

Ronald Schindler

Literaturo – kaj instrua kaj amuza

La 22an de septembro literaturemuloj povis ĝui atentokaptan vesperon en la kela trinkejo de nia renkontiĝejo en Danziger 50. Estis voĉlegitaj laŭ persona ŝato elektitaj beletraj «perloj» de la Esperanto-literaturo. Ni aŭdis i.a. sonetojn de Kalocsay (1891–1971) el lia poemaro «Izolo», eltiraĵojn el la fama «Tempesto sur Akonkagvo» de Tibor Sekelj (1912–1988), la satiran eseon «La Esperanta Vortludo» de Reto Rosetti (1909–1994) kaj kelkajn poemojn de Edwin de Kock (*1930) kaj Leonard Nowell Mansell Newell (1902–1968), por ne forgesi la humurplenan fabelon «La milito de la ĉapeloj» de Louis Beaucaire (1925–1983). Legis Fritz Wollenberg, Henryk Wenzel, Sebastian Hartwig kaj Gerd Bussing.

Sebastian krome pliriĉigis la vesperon ludante gajajn melodiojn sur koncertino (speco de malgranda akordiono) kaj kantante hororbaladon (germane: Moritat) de Tomas Pumpr (1906–1972).

La ĉeestantoj vigle pridiskutis la aŭditajn tekstojn kaj ricevis informojn pri la aŭtoroj. Oni proponis de tempo al tempo ripeti similajn literaturajn rondojn kadre de la programo de Danziger 50.

Gerd Bussing

La forte plilarĝita

Berlina Komentario pri la Fundamento de Esperanto

Unua Parto: Antaŭparolo, Gramatiko, Ekzercaro. 2-a eld. Sept. 2014, 303 p.

Dua Parto: Vortaro Oficiala (Universala Vortaro). 4-a eld. Sept. 2014, 364 p.

estas senkoste elŝutebla de

<http://www.esperanto-konsultejo.info/bk.htm>

Enhavo

Kiel oni diras en «ĝusta kaj bona» Esperanto? – Plej multajn respondojn al tiu centra demando de instruado ni trovas en la verko «Fundamento de Esperanto». Ĝia unua eldono estas de 1905, ĝia aktuala stato de 2007.

La Unua Parto de la Berlina Komentario sisteme klarigas demandojn cirkaŭ la ĉefa normo de Esperanto, troveblajn en la «Deklaracio pri la Esenco de la Esperantismo», en la Antaŭparolo, Gramatiko kaj Ekzercaro de la Fundamento.

La Komentario plie enkondukas en la Akademiajn Korektojn kaj la Oficialajn Aldonojn kaj elmontras rolon kaj taskojn de la Akademio. Kune kun la vort-orientita

«Dua Parto pri la Vortaro Oficiala» tiel ekestas plena sistema konsult-verko pri ĉiuj demandoj cirkaŭ la «lingvo-konstitucio» de Esperanto. Tiu ĉi dua eldono de la ĝenerala parto estas forte ampleksigita kaj traktas multajn temojn ne jam troveblajn en la unua eldono. Ambaŭ volumoj kune estu utila helpilo por instruistoj, progresintaj lernantoj kaj ĉiuj, kiuj interesiĝas pri ĝusta Esperanto.

Kelkaj temoj:

- Ĉu ŭ antaŭ vokalo?
- Ĉu nova pronomo ŝi-li?
- Ĉu «geonkloj», «genepoj»?
- La teorio pri vortfarado de la Akademio - ĉu laŭfundamenta?
- Ĉu la Akademio estas la «aŭtoritata centra institucio» pri kiu parolas la Fundamento?
- Ĉu «bonlingvismo» estas laŭfundamenta?
- k.m.a.

Bernhard Pabst

Kio mankas...

En la retejo www.esperanto.berlin/ vi povas regule legi pliajn informojn, kiuj pro spacomanko ne povis eniri la paperajn eldonojn de EIBB, ekz.

- Raporto pri la Septembra Ludado 2014
- Klubejo kun senŝlosila aliro
- Esperanto in drei Wochen
- Interreta mapo de Esperanto en Berlino

k.m.a.

Einladung zur Mitgliederversammlung der Esperanto-Jugend Berlin

Der Vorstand der Esperanto-Jugend Berlin e.V. lädt zur außerordentlichen Mitgliederversammlung am 29. November 2014, 10:00 in die Einbecker Straße 36, Erdgeschoss, links, ein. Ziel der Versammlung ist die Behandlung des Antrags des Vorsitzenden, den Verein aufzulösen.

Tagesordnung

1. Einleitung
2. Begrüßung
3. Feststellung der Beschlussfähigkeit
4. Feststellung des Stimmrechts
5. Wahl eines Versammlungsleiters
6. Wahl eines Protokollführers
7. Abstimmung über die Tagesordnung
8. Vorstellung und Diskussion des Rechenschaftsberichts 2013
9. Vorstellung und Diskussion des Kassenberichts 2013
10. Vorstellung des Berichts der Kassenprüfer
11. Vorstellung und Diskussion des Inventurberichts
12. Entlastung des Vorstands
13. Behandlung des Antrags zur Auflösung des Vereins
14. Vorstellung und Diskussion des Antragstexts
15. Abstimmung über den Antrag
16. Wahl von Liquidatoren
17. Sonstiges

Antragstext zu 7: Der Vorsitzende Chuck Smith beantragt: «Die Esperanto-Jugend Berlin soll aufgelöst und aus dem Vereinsregister gelöscht werden. Alle bisherigen Aktivitäten können in der Esperanto-Liga Berlin e.V. fortgeführt werden.»

Nach § 9 (2) der Satzung ist für die Auflösung eine Vier-Fünftel-Mehrheit der anwesenden ordentlichen Mitglieder erforderlich.

In der Hoffnung auf zahlreiches Erscheinen der Mitglieder grüßt

Chuck Smith
Vorsitzender Esperanto-Jugend Berlin e.V.

Einladung zur außerordentlichen Hauptversammlung der Esperanto-Jugend Brandenburg-Berlin

Der Vorstand der Esperanto-Jugend Brandenburg-Berlin e.V. lädt zur außerordentlichen Mitgliederversammlung am 29. November 2014, 11:00 in die Einbecker Straße 36, Erdgeschoss, links, ein. Ziel der Versammlung ist die Behandlung des Antrags des Vorsitzenden, den Verein aufzulösen.

Tagesordnung

1. Einleitung
2. Begrüßung
3. Feststellung der Beschlussfähigkeit
4. Feststellung des Stimmrechts
5. Wahl eines Versammlungsleiters
6. Wahl eines Protokollführers
7. Abstimmung über die Tagesordnung
8. Vorstellung und Diskussion des Rechenschaftsberichts 2013
9. Vorstellung und Diskussion des Kassenberichts 2013
10. Vorstellung des Berichts der Kassenprüfer
11. Vorstellung und Diskussion des Inventurberichts
12. Entlastung des Vorstands
13. Behandlung des Antrags zur Auflösung des Vereins
14. Vorstellung und Diskussion des Antragstexts
15. Abstimmung über den Antrag
16. Wahl von Liquidatoren.
17. Sonstiges

Antragstext zu 7: Der Vorsitzende Chuck Smith beantragt: «Die Esperanto-Jugend Brandenburg-Berlin e.V. soll aufgelöst und aus dem Vereinsregister gelöscht werden. Alle bisherigen Aktivitäten können in der Esperanto-Vereinigung Berlin Brandenburg e.V. fortgeführt werden.»

Nach § 9 (1) der Satzung ist für die Auflösung eine Vier-Fünftel-Mehrheit der anwesenden ordentlichen Mitglieder erforderlich.

In der Hoffnung auf zahlreiches Erscheinen der Mitglieder grüßt

Chuck Smith
Vorsitzender Esperanto-Jugend Brandenburg-Berlin e.V.

Kontaktoj:

Germana Esperanto-Asocio

Einbecker Straße 36, 10317 Berlin, infozentrum[ĉe]esperanto.de

konto: 860 3600 ĉe Sozialbank Mainz (banka kodo: 550 205 00)

Ekde 2011 ĉiuj brandenburgiaj kaj berlinaj esperantistoj direkte demandojn rilate al sia membreco rekte al la supra adreso!

Esperanto-Asocio Berlin-Brandenburgio kaj Esperanto-Liga Berlin e. V:

Einbecker Straße 36, 10317 Berlin,

eabb[ĉe]esperanto.de

konto: 70550102 ĉe Postbank Berlin (banka kodo: 10010010)

Prezidanto: Felix Zesch, tel.: 030 81809112

Vicprezidanto: Ronald Schindler, tel.: 033605 524138

www.esperanto.berlin

EsperantoLand e.V. :

Lu Wunsch-Rolshoven, tel.: 030 685 5831, esperantoland[ĉe]esperantoland.de,

www.EsperantoLand.de

Esperanto? Plenbuŝe! - praktikada tablorondo:

Philippe Beaudonnet, tel.: 030 217 562 33, philippe.beaudonnet[ĉe]gmx.net

Ĵaŭda Rondo:

renkontiĝejo: Einbecker Straße 36, 10317 Berlin, tel. 030 428 578 99

Grupo Lietzensee:

Hans Moser, tel.: 030 8621411

Presindikoj

Eldonas: Esperanto-Asocio Berlin-Brandenburgio

Kompilis kaj engaĝigis: Philippe Beaudonnet (eibb[ĉe]esperanto.de)

Reta versio: <http://esperanto.berlin/>, **reta dezajno:** Chuck Smith

Esperanto-Informilo Berlin-Brandenburgio estas la oficiala organo de Esperanto-Asocio Berlin-Brandenburgio kaj de Esperanto-Ligo Berlin

Esperanto-Kalendaro por oktobro kaj novembro 2014

Ĉiun ĵaŭdon je la 20a horo *Ĵaŭda Rondo*, Berlin, Einbecker Straße 36

Ĉiun ĵaŭdon 19a 15-20a 45: **Porkomencanta kurso** – Café Slubfurt, Lindenstraße 6, 15320 Frankfurt. Ronald Schindler, tel.: (033605) 52 41 38, RonaldSchindler[ĉe]web.de

Oktobro 2014

22-a, merkredo	15a 00 - 16a 30	Grupo Lietzensee. – Trautenastr. 6, 10717 Berlin. Esperanto-Buchlektüre / Esperanto librolegado
25-a, sabato	10a 00 - 14a 00	Trisemajna Esperanto-Kurso/Kurs Esperanto in 3 Wochen en Piraten-Vor-Ort-Büro, Crellestrasse 33, 10827 Berlin
26-a, dimanĉo	11a 00 - 16a 00	Trisemajna Esperanto-Kurso/Kurs Esperanto in 3 Wochen en Piraten-Vor-Ort-Büro, Crellestrasse 33, 10827 Berlin
27-a, lundo	19a 30- 21a 30	danziger50. – Vorgestellt werden das Gerhart-Hauptmann-Museum in Erkner im Land Brandenburg mit seinen Partnern in Polen und Deutschland und das Manuskript einer Gerhart-Hauptmann-Übersetzung ins Esperanto, das in Budapest auftauchte und für die Herausgabe im Berlin-Brandenburger Jubiläumsjahr vorbereitet wird von Johann Pachter.
31-a, vendr.	19a 30	Esperanto? Plenbuŝe! – la praktikada tablorondo dekjariĝas kaj festas en la vjetnama restoracio Chay Viet, Brunnenstr. 164, 10119 Berlin

Novembro 2014

4-a, mardo	14a 00 - 15a 30	Grupo Lietzensee – Nachbarschaftshaus am Lietzensee e.V., Herbartstraße 25, 14057 Berlin. Wir üben freies Sprechen in kleinen Sätzen
10-a, lundo	19a 30- 21a 30	danziger50. – «Die polyglotte Bewegung und das Sprachenlernen per Internet.» – Vortrag von Judith Meyer - - «La poliglota movado kaj lingvolernado per la interreto» – prelego de Judith Meyer.
13-a, ĵaŭdo	18a 00	Orangerie des Kiezspinne e.V., Schulze-Boysen-Straße 38, 10365 Berlin – Eröffnung der Ausstellung «111 Jahre Esperanto in Berlin und Brandenburg»
14-a, vendredo	19a 30 - 22a 00	EsperantoLand , renkontiĝo en kafejo «Arema», Birkenstraße 30, 10551 Berlin (metrostacio Birkenstr.)
19-a, merkredo	15a 00 - 16a 00	Grupo Lietzensee. – Trautenastr. 6, 10717 Berlin. Esperanto-Buchlektüre / Esperanto librolegado

22-a, sabato	14a00 21a00	Novembra ludado – Spielenachmittag , Eiscafé Kibo, Transvaalstr. 13, 13353 Berlin (U6 Rehberge)
21-a, vendredo 23-a, dimanĉo	Tuttage Tuta aranĝo: 25 €	24. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik. ver.di Jugendbildungsstätte, Stößerstr. 18, 13505 Berlin; Schwerpunktthema: "Die Plansprachenbewegung rund um den Ersten Weltkrieg" U.a. mit: C. Brosch: <i>Ideologische Auseinandersetzungen um Plansprachen im Ersten Weltkrieg</i> , C. Mannewitz: <i>Plansprachen und die heutige Friedensbewegung</i> ; J. McElvenny: <i>Die Kreolsprache Unserdeutsch aus interlinguistischer Sicht</i> ; D. Blanke: <i>Plansprachen und Stenografie</i>
24-a, lundo	19a 30- 21a 30	Danziger 50. – Wer waren die Gründer? Vortrag und Diskussion aus Anlass der Gründung der ersten Berliner Esperanto-Gruppe vor 111 Jahren – Kiuĵ estis la fondintoj? Prelego kaj diskuto okaze de la fondo de la unua Berlina Esperantogrupa antaŭ 111 jaroj – Fritz Wollenberg.
25-a, mardo	14a 00 - 15a 30	Grupo Lietzensee – Nachbarschaftshaus am Lietzensee e.V., Herbartstraße 25, 14057 Berlin. Esperanto-Geschichte & Pläne 2015
28-a, vendredo	20a	Esperanto? Plenbuŝe! – praktikada tablorondo
29-a, sabato	10a 00	Mitgliederversammlung EJB , Einbecker Straße 36, 10317 Berlin
29-a, sabato	11a 00	Außerordentliche Hauptversammlung EJBB , Einbecker Straße 36, 10317 Berlin
29-a, sabato	14a 00 18a 00	Zamenhoffesto – Zamenhof-Fest – ORANGERIE, Schulze-Boysen-Straße 38, 10365 Berlin

Decembro 2014

3-a, merkredo	11a00 14a30	Gruppe Lietzensee: Adventsfeier Seniorenwohnhaus Trautenastr. 6, 10717 Berlin. Wir beginnen mit einer kleinen Kaffeetafel, es folgen Gedichte, Singen, Plaudern, etwas Klassik, Singen und dann gehen wir ins Restaurant (indisch, deutsch) zum Mittagessen, 13 Uhr.
8-a, lundo	19a30	danziger50 Unser Klubjahr im Rückblick mit Fotos, Filmen und anderem. Alle Besucher sind aufgefordert, dazu beizutragen. Bitte auch etwas für das leibliche Wohl unserer gemütlichen Runde mitbringen!
13-a, sabato	14a00 21a00	Decembra ludado – Spielenachmittag , Eiscafé Kibo, Transvaalstr. 13, 13353 Berlin (U6 Rehberge)